Dumonata
periodaĵo
por la aktivuloj
de FEL

Numero 14
Septembro 1996



Estimataj FEL-anoj,
Karaj geamikoj,

Ni troviĝas je la sojlo de nova aktivecjaro. Mi ŝatus prezenti al vi ĉiuj miajn sincerajn bondezirojn de agrabla kunlaboro kaj ĝoja kunesto.

Kiel vi certe jam scias, FEL devos serĉi novajn vojojn por sekurigi la bezonatan subvenciadon de la Flandra Registaro. Povas esti ke niaj membroj ne tiel maltrankviliĝas pri tiu afero. Povas esti ke Esperanto estas nur agrabla hobio, aŭ iu ebleco por renkonti amikojn (des pli bone se estas eksterlandanoj) kaj trankvile babili aŭ diskuti. Sed ankaŭ povas esti ke niaj membroj jes mal-trankviliĝas pri la estonteco de Esperanto en nia lando, kaj ke ili pretas vere kunlabori kun sia asocio, do kun FEL.

Iuj opinias ke FEL faras nenion. Nu, kiu estas FEL ? Ĉu ne estas ĉiuj membroj individuaj ? Ĉu ĉiu membro faras nenion ? Evidente ne ! Sed ĉu vi konas la diraĵon: 'Be good and tell it' ? La membroj estas tro modestaj, FEL estas tro modesta. Vi certe konas geamikojn kiuj senlace agadas por Esperanto; ĉu vi kuraĝas aserti ke ili faras nenion, ĉar ili ne fanfaronas pri tio ? Ankaŭ ili estas FEL.

Mi nur volis konkludi ke ni mem agadu, en kunlaboro kun la aliaj membroj, la aliaj kluboj. Kaj eble ni estu pli fieraj pri la rezultoj kaj ni pli rapide informu la aliajn membrojn *kaj* la eksteran mondon.

Karaj geamikoj, komunikado estas problemo ne nur en Eŭropa Unio sed ankaŭ en Esperantio ! Do: 'Ni estu bonaj kaj diru tion'. Ekdu nun ni ĉiuj laboru kune kaj helpu unu la alian por atingi multoblan rezulton. Tion mi vere deziras al vi ĉiuj.

Flory

Enhavo

Programo por sabato, 14 septembro 1996 . . . . . . . . . . . . . . . . 3
Vlaanderen 2002 . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 3-6
Reagoj . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 6-7
Interreto . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 8
Internationale samenwerking in het onderwijs . . . . . . . . . . . . . 8
Praktijksessie Leuven: verslagen + grafieken . . . . . . . . . . . . 9-13
Sugesto: biografio de A.J. Witteryck . . . . . . . . . . . . . . . 14-15
Helpopeto en Benino . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 16
Internacia Tradukreto . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 16
Helpu ! . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 16
Het Andere Boek . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 16

## Programo por sabato, 14 septembro 1996

8.30-10.00: Estrarkunveno

Dagorde:

- goedkeuring verslag vorige vergadering
- ronddelen briefwisseling
- financiële gevolgen voorstel ivdu betreffende zending Horizontaal ?
- actie bij Euro-Parlementairen
- kongres Stuttgart
- BEF-jaarvergadering - FEL-leden
- subsidiedossier - mogelijkheden ?

10.00-12.30: Ideo-interŝanĝo por la projektiniciatintoj (vidu p. 8)

14.00-15.30: Libera vizito al la centro (informoj sur la mezaj paĝoj)

15.30-16.30: Algemene Vergadering van de Vlaamse Esperantobond

Dagorde:

- Goedkeuring van het budget 1997
- Goedkeuring van het activiteitsplan voor 1997
- Goedkeuring van het voorstel Ivo Durwael over een nieuwe ledenstructuur

## Protokoloj

Korekto: Vertikale 13, paĝo 27, sube: "bestuursvergadering, 96.01.27, ..."

## Vlaanderen 2002

En majo 1996 la estraro decidis sendi leteron al ĉefministro Van den Brande por klarigi la rolon de FEL en la internacia elradio de Flandrio. Sur la sekvaj paĝoj estas kopioj de la letero de FEL kaj de la respondo de la ĉefministro. Poste sekvas 2 projektoj kiuj ŝajnas taŭgaj por FEL-partopreno. (La kompleta listo de 21 projektoj estas disponebla en la centro.)



(letero FEL al Luc Van den Brande pri ‘beleidsbrief 1995 Vlaanderen Internationaal’)

(respondo VdBrande al Flory Witdoeckt)



## Enkele pilootprojecten voor Vlaanderen 2002

2) Het Vlaams Onderwijs en Europa

Van de klassieke klasreis in de lagere afdelingen over de schoolsport tot uitwisselingen op universitair niveau. De onderwijswereld biedt een prachtige waaier van mogelijkheden om de Vlaams-Europese contacten te verzorgen. We zijn vooral op zoek naar onderwijsprojecten die van deze Europese contacten gebruik maken, om niet alleen zichzelf, maar ook Vlaanderen bekend te maken bij hun Europese bezoekers of gasten.

13) Internationale Wetenschappelijke Congressen

De Vlaamse Interuniversitaire Raad (VLIR) is uitstekend geplaatst om ervoor te zorgen dat in 2002 Vlaanderen gastland is voor topcongressen in de disciplines waarin Vlaanderen sterk staat (biotech, micro-elektronica...)

**Ĉu jam io realigeblos okaze de la Eŭropa Kongreso de 1997 en Oostende ?**

## Reagoj

(1) de Marc Vanden Bempt

Fine Vertikale reaperas. Mi konsentas kun Roland ke ĝi estas ege utila informilo por la FEL-aktivuloj. Ĝi aperu sufiĉe ofte, ekzemple ĉiujn 2-3 monatojn.

Pri la aserto ke "FEL multflanke lamas" mi ne konsentas. Mi supozas ke tio estas vidpunkto de Roland persone, ne de FEL. Ne ĉio funkcias glate, sed ĉu ekzistas iu asocio aŭ eĉ kompanio kie ĉio funkcias glate? Mi neniam vidis tian. Mi supozas ke la helpokrio de Paul Peeraerts klarigas multon: se ne restas tempo por la necesasj farotaĵoj, tiam estas normale ke oni jen kaj jen ion forgesas. Nur ne grumblu pri tio.

Pluraj raportoj en Vertikale 13 malaktualiĝis. Tamen utilas legi la raporton jaron poste, por konstati kiom intertempe okazis kaj kiom ne. Mi legis en p. 30 ke la nova estraranino Hélène Van der Steen tiutempe ankoraŭ nomiĝis "Hilde" ... En p. 31 mi legis ke Petro Desmedt tradukos "Van den vos Reynaerde"; pasintjare aperis tiu poema rakonto kiel "Roënoot de vos", en la lovena dialekto; eble utila al Petro? Li nur diru...

Mi legis pri la ĝenerala kunveno en la 14a de septembro. Ĉiuj tien! Pri la antaŭtagmeza kunveno, nur por projekt-iniciatintoj (kaj kandidatoj por sekvaj projektoj), mi ne legis. Sed jes en Vertikale 14, ĉu ne?

Mi esperas ke kompatinda Paul ricevos multajn reagojn al sia helpopeto! Se Vertikale povas nur kontribui al tio, ĝi evidentiĝus tute utila.

(2) de Piet Glorieux: kopiita sur sekva paĝo.

(2) Reago de Piet Glorieux pri kortrijkanoj kaj biblioteko (enkopiita)



## Interreto

Nederlanda eduka televido TELEAC/NOT ekde septembro ripetos sian kurson "Internet in de Praktijk". Por belgoj la kursmaterialo ne vere utilas, ĉar oni ja devus telefoni al Nederlando por uzi ĝin. Tamen, eĉ sen tiu kurso tre interesaj estas la TV- kaj radio-programoj por ekscii kiel funkcias Interreto kaj kio eblas per ĝi.

Unua TV-elsendo je dimanĉo, 29 septembro, 11.30-12.00 h., TV2. Radio 5 ĉiun jaŭdon (21.00-22.00 h.) havas programon "TeleScoop" en kiu aktualaĵ-oj, i.a. rilate al komputiloj, estas pritraktataj. Bedaŭrinde Radio 5 nur elsendas tra mezaj ondoj (298 m, 1008 kHz) kaj foje estas malfacile aŭskultebla.

La TELEAC-broŝuro estas havebla ĉe Standaard Boekhandel. Informoj krome haveblas en nederlanda teleteksto (indekspaĝoj 250 kaj 340) kaj en TTT (www.omroep.nl/teleac/ kaj www.teleac.tip.nl).

## Internationale samenwerking in het onderwijs

Centra voor permanente educatie, bedrijven, universiteiten en lagere overheden gaan op diverse onderwijsterreinen "grenzeloos" samenwerken dankzij 109 projecten die op 27 juni 1996 door de Europese Commissie geselecteerd zijn. Deze projecten ontvangen in het kader van het Socrates-programma zo'n 3 miljoen ecu (1 ecu = 39 BEF) uit het Europees budget. Ze hebben betrekking op drie aspecten binnen het onderwijs: ten eerste het afstandsonderwijs met gebruik van de nieuwe technologieën, met name multimedia; vervolgens het algemene volwassenenonderwijs - in het bijzonder talen en kennis van de Europese Unie; en ten slotte de opleiding van taalleraren. De volgende vervaldatum voor mogelijke deelnemers aan het Socrates-programma binnen dezelfde sectoren is 1 februari 1997.

Europa zonder grenzen, 7/8-1996

teksto "Nur por la projekt-iniciatintoj"

inter p. 8 kaj 9: demandaro okaze de ‘malferma pordo’ je 14 septembro 1996

(Praktijdsessie projectmatig werken Leuven 22.6.1996, 1)



(Leuven 2)

(Leuven 3 - grafikoj)



(Leuven 4 - grafikoj)

(Leuven 5 - grafikoj)



## Sugesto

Unu el la taskoj de FEL por ricevi subvencion estas eldoni libro(j)n. Okaze de vizito al Fondaĵo Vanbiervliet en Kortrijk, germano faris jenan mini-biografion de A.J. Witteryck, grava persono el la komenca epoko de Esperanto. Lia demando: kiam aperos plurcentpaĝa biografio de Witteryck ?

RR

(tekst 1,5 p. Witteryck)

(tekst "FEL-manlibro...)

(hiernavolgende tekst kan eventueel wegvallen indien niet voldoende plaats)

## Esperanto-radiostacioj en Interreto

Bruno Masala sukcesis enmeti ĉiujn informojn pri Radio en datumbanko.
Jen la URL-kodoj:
- aktualaj novaĵoj pri Radio:
http://www.worldnet.net/~bmasala/AERA/arkiv/txt/novajhoj.txt
- por internacia frekvencaro:
http://www.worldnet.net/~bmasala/AERA/arkiv/txt/frekvint.txt
- por adresaro de internaciaj stacioj:
http://www.worldnet.net/~bmasala/AERA/arkiv/txt/adresint.txt
- por retpoŝte atingeblaj radio-redakcioj
http://www.worldnet.net/~bmasala/AERA/arkiv/txt/radinet.txt
-por lokaj programoj:
http://www.worldnet.net/~bmasala/AERA/arkiv/txt/lokstaci.txt



## Helpopeto el Benino

Gaston HOUSSOU (B.P. 163, Cotonou, Bénin) en oktobro kaj novembro estos en Eŭropo. Je 5-6 oktobro li partoprenos en Poitiers ĝeneralan asembleon de Monda Fonduso de Solidareco kontraŭ la Malsato. Poste li per trajno vojaĝos al Lublin (Pollando) por plibonigi sian lingvoscion en seminario de TEJO/SEL. Pri lia E-aktiveco aperis artikoloj en revuoj Juna Amiko (75, p. 6-7) kaj Esperanto (dec. 95, p. 216). Ĉar li mem ne kapablas financi la tutan vojaĝon, li serĉas monhelpon de 1000 NLG. Pagoj eblas al UEA-konto hssg-x aŭ tra Hans BAKKER (Kastelenstraat 231, NL-1082 EG AMSTERDAM)

## Internacia Tradukreto

Unu el la lovenaj projektoj estas "een vertaalbureau oprichten" (A804). Tia tradukreto jam ekzistas kaj (etskale) funkcias. La respondeculo serĉas tradukantojn por la nederlanda lingvo. Adreso: ITRE, s-ro Daniel DURAND, Les Nids, F-49190 SAINT-AUBIN-DE-LUIGNE, fakso +33 41.78.47.75.

## Helpu ! Help !

(daŭrigo)

* Legemulo kiu sisteme legas la multajn revuojn kiuj alvenas ĉe FEL kaj transdonas utilajn informojn al koncernataj personoj (ekzemple la projektestroj). Herman Deceuninck kandidatiĝis, sed serĉas iun kiu regule povas transporti la dokumentojn de la centro al Bruselo.

* Desegnanto de reklamoj por la FEL-produktoj (precipe verkado de tekstoj). Per siaj eldonoj FEL havas senpagajn reklameblecojn, sed nun daŭre revenas la samaj tekstoj kaj novaj produktoj (ekzemple libroj) estas ne aŭ ne sufiĉe frue anoncitaj.

* Redaktoro por la kalendaro "La Jaro", kiu interesiĝas pri geografio, politiko, ŝtatoj, lingvoj, ktp. La precipa tasko estas daŭre ĝisdatigi la enciklopedian parton, ankaŭ surbaze de reagoj de uzantoj. La tasko povas esti farita hejme, de iu kiu posedas komputilon. Uzado de la programo Ĉapelilo estas rekomendinda.

RR

## Het Andere Boek

28 en 29 september van 11 tot 19 u, met stand van de Vlaamse Esperantobond, in de Stadsfeestzaal, Meir te Antwerpen.
Wie wil meewerken in de stand contacteert Jacques Schram of Ilja De Coster.